Eŭropa Bulteno

Februaro 2014, Numero 135

## PROGRAMO DE LA ANTAŬKONGRESO PRETA



La Loka Kongresa Komitiato de la 10-a kongreso de EEU decidis ke lige al la kongreso okazos ankaŭ antaŭkongreso kun pure turisma enhavo, kies organizon transprenis David Rey Hudeček. La aliĝado okazas rekte ĉe la organizanto pere de la kongresa paĝaro kaj ankaŭ la pagoj iras al la kontoj de EEU ĉu ĉe UEA ĉu ĉe la belga banko. Kiel vi povas vidi en la materialo disponigita de la organizanto, la antaŭkongreso ebligos al la partoprenantoj vidi la plej atrakciajn naturbelaĵojn kaj kulturhistoriajn objektojn de Kroatio: la insularon Kornati, la nacian parkon kun famaj akvofaloj Plitvice kaj la historiajn urbojn Trogir kaj Split, kun monumentoj el la periodo de romia imperio kaj venecia ŝtato. La loko, en kiu la antaŭkongresanoj loĝos kaj de kiu ili iros viziti planitajn celojn, estas Biograd na moru, urbeto ĉirkaŭ 100 km for de Rijeka ĉe la adriatika marbordo. Detalojn rigardu en la paĝaro: http://eeu-kongreso.webnode.com/anta%C5%AD-kaj-postkongresoj/

Pensu ke la rabatitaj prezoj por la kongresa aliĝo estas fino de marto. Do, ne atendu pri aliĝado kaj planu vian vojaĝon tuj.

Maja Tišljar

# RAPORTO DE LA ESTRARO PRI LA LABORO DE EEU EN 2013

**Ekstera Agado**

La Platformo por multlingveco laŭ la decido de Europa Komisiono pluaktivis en 2013 kaj en ĝi nun estas ne nur EEU sed ankaŭ E@I kaj la studenta organisaĵo AEGEE, kies nuna reprezentanto estas ankaŭ esperantisto kaj tiel praktike esperantistoj havas 5 membrojn en ĝi. Okazis en 2013 kunsidoj de la Platformo en Bruselo la 8-an de marto 2013 kaj la 12-an de oktobro 2013 kun aktiva partopreno de Seán Ó Riain, Jozefo Reinvart, Maja Tišljar kaj Petro Balaž.



Dum 2013 EEU funkciis kiel kunordiganta kaj ĉefrespondeca partnero rilate la aprobitan eŭropan projekton Lingvo.info kun 8 aliaj eŭropaj partneroj kaj kompleta budĝeto dum la jaroj 2013 kaj 2014 de 530.000 eŭroj. Tiusence okazis 3 kunsidoj: en Berlino (22-23. marto), Poznano (30. junio – 02. julio) kaj Ljubljano (2-4. novembro). La realigon kunordigas Maja Tišljar kaj kunlaboras en unuopaj taskoj ankaŭ Nikola Rašić, Seán Ó Riain, Zlatko Tišljar kaj Flory Witdoeckt. Post la unua duono de la projekto kiu estis en novembro 2013 Maja Tišljar verkis ampleksan raporton por EACEA (agentejo de Eŭropa Komisiono kiu kontrolas la projektojn) kaj la raporto estis akceptita kun tre bona noto. Ĝi gajnis 80% de la eblaj punktoj pri kvalito de la realigo, kio estas tre bona sciante ke maksimumo ricevebla estas 90%. Dum 2014 la projekto devos esti finita (ĝis fino de novembro) kaj la plej granda problemo restinta estas kiel havigi la propran monparton, ĉar la kontrakto antaŭvidas ke 20% de la kostoj kovras la realigantoj mem. Tio estas 130.000 eŭroj. El tio 60.000 devas trovi la partneroj kaj 70.000 EEU mem. La nura maniero atingi la propran enspezon estas peti helpon de la membraro donaci kontribuojn. Se EEU sukcesos ne nur bone realigi la projekton (pri kio ne estas dubo, kion jam montris bonaj notoj en la mezo de la projekto) sed ankaŭ solvi la financajn devojn, ĝi atingos altan prestiĝon en EU kaj povos ricevi pliajn projektojn kaj eble eĉ subvencion por regula agado kiel platforma eŭropa asocio de neregistaraj organizoj. Pro tio estos granda defio por EEU animacii la membraron kaj konvinki ĝin pri bezono de financa helpo. La paĝaro de la projekto, en kiu post la projektofino estos la tuta rezulto de la laboro estas ĉe: http://lingvo.info/en/



La projekto „Kia estus Eŭropo sen EU?" finiĝis en januaro 2013 kaj estis transdonita sukcese la raporto post kio EU elpagis la lastan duonon de la financoj. La lasta elemento kiun EEU faris por finplenumi ĉiujn taskojn de tiu ĉi projekto estis eldono de libro kun referaĵoj de ĉiuj partoprenintaj prelegantoj kaj kun raporto kaj konkludoj de la konferenco. La libro aperis paperforme je 232 paĝoj kun 13 prelegoj en 5 lingvoj (Ĉiu prelego aperis en la nacia lingvo de la preleganto kaj en Esperanto. Krome EEU

finprodukstis ankaŭ paĝaron dediĉitan al la projekto en kiu ankaŭ legeblas ĉiuj prelegoj kaj estas priskribita la tuta projekto: http://wieeu.webnode.com.

Okaze de la Eŭropa Tago de la Libro EEU kune kun sia slovena projektpartnero Asocio por Eŭropa Konscio okazigis solenan lanĉon de la libro la 25-an de septembro en Maribor.

Rilate la tutpopolan iniciaton al Eŭropa Komisiono ke la eŭropanoj esprimu sian subtenon al nia ideo kanti eŭropan himnon en Esperanto laŭ la teksto de Umberto Broccatelli ni esploris la plej bonan manieron prezenti nian plendon al eŭropa ombudsmano konsultante fakulojn kaj advokatojn. Ni decidis plendi en 2014 iom antaŭ la limdato (majo 2014).

Maja kaj Zlatko Tišljar ellaboris komence de la jaro 3 projektojn por financado de EU (por civitanaj organizoj kiuj bedaŭrinde ne estis akceptitaj) kaj fine de la jaro novan projekton por la regula financado de eŭropaj tegmentaj asocioj de neregistaraj asocioj kaj preparis sin por pliaj petoj studante novan financan planon de EU Erasmus+. Tiusence la novaj konkursoj estos en la unua kvarono de 2014.

La membroj de la estraro, sed ankaŭ aliaj aktivuloj kaj asembleaj membroj partoprenis en aro da neesperantistaj politikaj, sciencaj kaj interesorganizaj konferencoj kaj aranĝoj diverstipaj. Aparte elstaris la laboro de Jozefo Reinvart kaj Petro Balaž en Slovakio kaj de nia prezidanto Seán Ó Riain.



La 8-an de februaro Reinvart kaj Balaž renkontiĝis kun la ministro pri edukado de Slovakio, Dušan Čaplović kaj havis fruktodonan interparolon rilate la proponon ke Slovakio iniciatu novan interregistaran konferencon kiu traktos justan multlingvismon en EU kaj iel traktos tiun temon dum la slovaka prezidado en EU en 2016. La 9-an de majo okazis en Bratislavo nacia konvencio de Slovakio pri EU kun partopreno de multaj gravaj slovakaj politikistoj en kiu aktive partoprenis ankaŭ Reinvart kaj Balaž. La 21-an de novembro Balaž kaj Reinvart parolis kun Ian Figel, vicprezidanto de slovaka nacia konsilio kaj iama membro de Eŭropa Komisiono pri la sama temo kadre de estontaj aktivadoj de Slovakio ene de EU. Seán Ó Riain parolis mallonge ankaŭ pri E kun la vicprezidanto de Eŭropa Komisiono Maroš Šefkovič la 4-an de majo. La 1-an de julio Seán prelegis en Frankfurto al eŭropaj lingvotestitoj pri propedeŭtika valoro de Esperanto kaj la 27-an kaj 28-an de septembro partoprenis en pola konferenco de lingvoinstruistoj kun 750 partoprenantoj kaj 3-foje prelegis pri propedeutika rolo de Esperanto en lingvoinstruado en Lodzo. Flory Witdoeckt partoprenis oficialan asembleon de FAIB, (Federacio de europaj neregistaraj organizoj), kie je la fino de la kunveno ŝi donacis al Rudi VERVOORT, Ministro-Prezidento de la Ĉefurba Regiono Bruselo, ekzempleron de la bildstrio *La Brusela Bubo*. Tiu kunveno okazis en hotelo *Le Châtelain* la 28-an de majo 2013.

Elstaris ankaŭ ĉi-jare kvalita aktiva partopreno en la 23-a Ekonomia Forumo en pola Krynica en kiu refoje estis organizita tre videbla stando de EEU, apud kiu pasadis dum 3 tagoj (3-5. septembro) pli ol 2000 partoprenintaj forumanoj inter kiuj ŝtatestroj, gravaj politikistoj, ekonomikistoj, bankistoj kaj pli ol 400 ĵurnalistoj. EEU organizis ankaŭ diskutpanelon pri la temo „Federacia Eŭropo: ĉu kun komuna lingvo por ties civitanoj?" en kiu prelegis Jozefo Reinvart (Sk), Georg Mildbrath (De), Artur Sosma (Lux-Pl), Halina Komar (Pl) kaj Petro




Balaž (Sk). Kune kun polaj esperantistoj gvidataj de Halina Komar ili partoprenis ankaŭ en aliaj aranĝoj de la Forumo kadre de kiuj Reinvart parolis kun pluraj gravaj politikistoj.

Gravaj atingoj por Esperanto en Eŭropo en kiuj EEU ne rekte partoprenis:
En Pollando la agado de pola EDE (Eŭropo-Demokratio-Esperanto) atingis ke pluaktivis la pola parlamenta grupo kiun gvidas senatano Edmund Wittbrodt kaj ili sukcesis transdoni al Pola Parlamento oficialan peton por proklami Esperanton pola kultura heredaĵo.
Okaze de Eŭropa Tago de Lingvoj Esperanto-asocioj organizis 12 aranĝojn en 9 eŭropaj landoj kiuj estis listigitaj en aparta listo de Konsilio de Eŭropo inter 427 aranĝoj entute tra la tuta Eŭropo.

La honora membro de EEU Etsuo Myjoshi starigis fondaĵon CIGNO kiu premias unu landan asocion kiu sukcesis atingi plej multajn sukcesojn en la informado pri Esperanto ekster la movado. En 2013 estis transdonita la premio al Ĉeĥa E-Asocio, dum la asemblea kunsido de EEU en Rejkjaviko (Islando) kie okazis la Universala Kongreso.
Speciale interesa fenomeno en kiu parte partoprenas EEU sed ankaŭ stimulas ĉiujn aliajn E-organizojn estas ĉiam pli granda nombro da projektoj financataj de EU kiujn ellaboris kaj projektis E-organizoj aŭ al E-ligitaj entreprenoj. En 2013 pli ol 20 diversaj E-organizoj partneras en minimume 5 diversaj novaj projektoj aprobitaj kaj financataj de Eŭropa Komisiono ĉefe kadre de Grundvig, Comenius kaj KA-2 (Lingvoj). Pri tio ni detale informis en Eŭropa Bulteno.

**Enmovada Agado**

Ni organizis la kunsidon de la asembleo de EEU dum la Universala Kongreso de UEA en Rejkjaviko (Islando) la 21-an kaj 26-an de julio 2013, kiu okupiĝis pri la administraj tagordaj punktoj kaj planoj por la estonto kaj kiu akceptis la raportojn por la jaro 2012. Aparte oni publike traktis la temon pri Eŭropa himno en Esperanto. La kunsidojn gvidis vicprezidantino Flory Witdoeckt.



La estraro kunsidis la 9-an de marto en Bruselo kiu interalie decidis pri la lokŝanĝo de la kongreso en 2014 al Rijeka (Kroatio), pristudis la asociajn financojn, diskutis pri evoluo de la projekto Lingvo.info, pri la laboro en la Platformo pri multlingveco kaj pri realigo de nia partopreno en UK kaj Ekonomia Forumo en Krynica.

La Eŭropa Bulteno regule aperis 11 fojojn (julia-aŭgusta numero estis komuna) ĉiu je 12-18 paĝoj. Ĝin ni publikigis en la paĝaro de EEU www.europo.eu kaj nur unuan jarduonon ankaŭ en www.gazetejo.org, kiu de post tiam ne plu funkcias. Redaktis ĝin la sekretario kaj teknike aranĝis Maja Tišljar.
En komencaj numeroj de la Eŭropa Bulteno aperis tri lastaj artikoloj el la serio pri la E-movadoj en ĉiuj EU-landoj. Baze de tiu preskaŭ tri-jara serio de artikoloj ni sukcesis kompletigi la tutan materialon pri la movadoj en 27 EU-landoj (mankas la Kipra kiu fakte startis en la jaro 2013). La sekretario redaktis elektronikan formon de la libro kun ĉiuj 27

artikoloj kaj EEU aperigis la elektronikan unikan libron kun kolekto de artikoloj pri Eŭropunia E-historio:
http://www.europo.eu/eo/documentloader.php?id=416&filename=europa-e-movado-2013-12-23-02-obojestransko-1.pdf
La kunlaboro kun UEA estis bona kiel kutime: Niaj reprezentantoj ĉeestis en kelkaj aranĝoj de UEA (malfermaj tagoj de UEA, en la komitatkunsidoj kaj komisionoj de UK en Rejkjaviko) kaj kunorganizis kun UEA (kiu helpis finance) la partoprenon en Eŭropa Ekonomia Forumo en Krynica (Pollando). UEA fondis en 2012 sian eŭropan komisionon en kiu membras ankaŭ Sean O Riain kaj Zlatko Tišljar kiuj aktive partoprenis konstante en ĝia laboro ankaŭ dum la tuta 2013-a jaro.. Ni ankaŭ sendis necesajn informojn por la jarraporto de UEA.
La **landa agado** estis kontentiga, kvankam ĉi-jare ni spertis ankaŭ malbonan eventon. Pro neklarigitaj kialoj Esperanto-Asocio de Britio (EAB) eksiĝis el EEU. Pri tio iom pli detale en novembra numero de Eŭropa Bulteno. Tamen la nombro de la landaj asocioj restis la sama ĉar fine de la jaro formiĝis Kipra E-Unio tiel ke fine E-movado havas asociojn en ĉiuj landoj de EU. KEU oficiale registriĝis en Kipro en januaro 2014. Pro la malaliĝo de Britio evoluis en la reto diskuto pri la kaŭzoj kaj ŝajnis ke la kaŭzo estas la politiko de EEU rilata al oficialaj instancoj de EU. Nome, tio ke EEU subtenas la eŭropajn integriĝojn kaj volas kontribui al ili malplaĉas al iuj. Montriĝis ke la nura kiu malakceptas tiun politikon krom la britoj estas la Hispana E-Asocio. Ĉiuj aliaj subtenas tiun direkton de la evoluo kaj ni konstatis ke ne ekestis iu ajn krizo en Eŭropa E-movado. Kiel kutime deko da landaj asocioj ne pagis sian kotizon pro ekonomiaj kaŭzoj aŭ pro tio ke kelkloke estas tre malaktivaj estraroj.
La estraranoj partoprenis ankaŭ en aranĝoj de landaj asocioj:



1. en la Pola E-kongreso en Lodzo partoprenis Zlatko Tišljar kaj prelegis pri naciaj identecoj kaj lingvoj (la 29-an de junio),
2. en Somera E-Studado en Martin (Slovakio) ankaŭ partoprenis Zlatko Tišljar havante du prelegojn kaj gvidante komencantan kurson (12-20-a de julio)
3. en Malferma Tago de UEA en Rotterdamo partoprenis Seán Ó Riain la 30-an de novembro
4. en kunveno de slovenaj esperasntistoj en Brežice (15. novembro) partoprenis Zlatko Tišljar kaj en la slovena solena kunsido de Zamenhoftago en Maribor la 7-an de decembro.
5. Flory Witdoeckt partoprenis en la Malfermaj Tagoj en Roterdamo la 27-an de aprilo kaj la 30-an de novembro kie ŝi prezentis la filmadon de la Eŭropa Himno en Oostende.

Bona kunlaboro pludaŭris kun Germana E-Asocio, kiu plu administras salajron de nia direktorino Maja Tišljar.
Krome ni realigis preskaŭ ĉiujn punktojn de nia laborplano por 2013.
Pri la retpaĝaro zorgis Maja Tišljar kiu ankaŭ kreis kaj zorgis pri la nova paĝaro de la kongreso en Rijeka. Ŝi kaj la sekretario organizis preparlaborojn por la 10-a jubilea EEU-kongreso en Rijeka (Kroatio). Startis kongresa paĝaro http://eeu-kongreso.webnode.com// kaj aperis paperforme prospektoj pri la kongreso. Startis Loka kongresa Komitato kiu havis la unuan kunsidon la 15-an de septembro 2013 en Rijeka. La prezidanto de LKK estas Boris di Costanzo. David Rey Hudeček el Zagrebo organizas 4-tagan antaŭkongreson en Kroatio, pri

kio la informoj troviĝas ankaŭ en la kongresa paĝaro. Lasta novaĵo estas ke la ŝtatprezidanto de Kroatio Ivo Josipović akceptis aŭspicii la kongreson. Ankaŭ la ĉefaj elementoj de la programo estas fiksitaj. Krom E-fakuloj pri la ĉeftemo: „Justa Eŭropo kun justaj lingvaj rilatoj" parolos ankaŭ kroataj universitataj profesoroj kaj unu parlamentano de Kroatio. Tiun laboron sukcese plenumis Nikola Rašić.



Ankaŭ la tuta administrado (prizorgo de dokumentaro, ellaboro de novaj projektoj kaj raportoj, prizorgo de financoj estis plene plenumita, kion prizorgis Maja Tišljar kaj Flory Witdoeckt. La estraro ankaŭ preparis ampleksan laborplanon por 2014-a jaro kiu aperis en la decembra numero de EB.

Maja Tišljar partoprenis en kelkaj kunvenoj de EU-organoj rilate financadon de neregistaraj organizoj kaj en laboro de la Platformo pri multlingvismo.

**Financoj**

La kotizpagado en 2013 estis simila kiel en 2012. Pagis la kotizojn 16 landaj asocioj: Aŭstrio, Belgio, Ĉeĥio, Danio, Finnlando, Francio, Germanio, Irlando, Latvio, Malto, Nederlando, Rumanio, Slovakio, Slovenio, Svedio kaj Kroatio. Ne pagis la jenaj LA-oj : Bulgario, Grekio, Hispanio, Hungario, Italio, Luksemburgio, Pollando, Portugalio, Litovio, Estonio kaj Britio. Plej zorgigas la insista nepagado de Hispanio jam dum 4 jaroj sinsekve kaj de Litovio. En tiuj landoj verŝajne temas pri intenca nepagado. En Hungario, Pollando, Portugalio temas pri malbona funkcado de iliaj estraroj kiuj evidente ne zorgas pri siaj devoj, Grekio kaj Luksemburgio verŝajne forgesis, Estonio estas la plej problema lando, ĉar ĝi neniam pagis kaj reagas al neniu iniciato de EEU, Bulgario havas seriozajn financajn problemojn, kaj kial ne pagis Italio – mi vere ne scias. Britio eksiĝis el EEU.

La jaro finance estis tre bona, ĉar ni ricevis unuan parton de la nove aprobita projekto (Lingvo-info) kaj la duan parton por la finita projekto „Kia estus Eŭropo sen EU?". La direktorino daŭre zorgas pri ellaboro de novaj projektoj kaj partopreno en pluraj konkursoj. Flory Witdoeckt ellaboris la financan raporton por la financaj instancoj de Belgio por 2012 kaj por la asembleo en Rejkjaviko.

Ni sukcesis pluteni la profesian laboron de Maja Tišljar (kiu ricevas salajron en Germanio, kie ŝi loĝas pro kontrakto inter EEU kaj GEA). Tio tre gravas, ĉar la kondiĉo por ricevi konstantan financadon kaj pli grandajn projektojn estas ke la asocio jam havas almenaŭ unu profesiulon kaj la amplekso de laboroj ĉiam pli vastiĝas.

Zlatko Tišljar, sekretario de EEU

# KOMUNA BAZA ESPERANTO-LERNOLIBRO POR LA LANDOJ DE EŬROPA UNIO

Kadre de la Eŭropa Komisiono de UEA evoluis diskuto pri retaj lernolibroj. Kiel konate, ekzistas la plej ampleksa reta kursaro de Esperanto www.lernu.net. Sed antaŭ du jaroj ties financantoj decidis renovigi ĝin. Ĝis nun en la retejo lernu.net ekszistis 6 diversaj porkomencantaj kursoj kaj kelkaj daŭrigaj. Por ne konfuzi la novlernantojn oni decidis simple havi nur unu retan kurson kiu sekvos la postulojn de la eŭropa kadro pri lingvoekzamenoj. Tiusence oni mendis kurson kiu estas ellaborata. Mi mem protestis pro tiu nova politiko, ĉar ĝi el pedagogia vidpunkto forigas la plej gravan Esperanto-avantaĝon: ĝian lingvofacilecon. Se oni kreas kurson kiu sekvas la postulojn de la ekzamenado laŭ la eŭropa kadro, oni devas havi en la komencaj lecionoj multajn vortojn kiuj por E-komencantoj ne gravas (rilataj al enposteniĝo, solvo de administraj problemoj dum enloĝiĝo en iu lando ktp). Tiuj vortoj ŝarĝas la lernanton per multa materialo nenecesa por ĉiutaga babilo kaj li ne povas rapide akiri flukapablon kaj kompreni ke Esperanto estas vere facila.




Sekvi nur la eŭropan kadron signifas ke la kurso celas akzamenojn necesajn por eŭropa labormerkato kaj estas ja klare ke Esperanton ankoraŭ longe oni lernos ne pro tio, ĉar ja ĝi ne helpas ricevi laboron kaj perlabori monon. Pro tio la centra valoro estas facileco de Esperanto, rapida eblo komuniki kun alilingvanoj ĉie tra la mondo. Por tiu celo estas kreita la Zagrebmetoda lernolibro, sukcese uzata por ĉiuj generacioj kaj edukniveloj jam dum 35 jaroj en dekoj da landoj. Pro tio ni interkonsentis en la komisiono ke ni lanĉu la kampanjon en EU-landoj meti sur siaj paĝaroj eblon lerni E-on en unua plej komenca grado laŭ la Zagreba lernilo, kiu uzas malpli ol 500 plej oftajn morfemojn kaj tel ebligas baze de minimuma sed nepre necesa materialo maksimume rapide akiri fluecon en la lingvouzo.

La metodo havas enretigitan version en Lernu.net por 29 lingvoj (nun ne plu uzebla en Lernu.net) kaj la estroj de lernu.net aprobis disponigi la materialojn por transdoni al naciaj retejoj. Por deko da eŭropaj lingvoj tia lernu.net elektronika versio ne ekzistas, sed ekzistas papera versio ĉe la aŭtoroj de la Zagreba Metodo kaj oni povas rapide prepari ilin en elektronika versio. La transdonebla versio ne estos samgrade interaktiva kia ĝi estis en lernu.net, sed la tekstoj de elektronika kurso estos je dispono en cifereca formo.

Tial EEU lanĉas la kampanjon: UNUFORMA BAZA E-KURSO EN EŬROPO KUN KOMUNA MINIMUMA LERNMATERIALO CELE AL LA PLEJ EFIKA KAJ RAPIDA SCIAKIRO DE BAZA KAJ LA PLEJ NECESA LINGVAĴO.
Kiam plej multaj landaj asocioj havos tian kurson en sia retejo, ĉiu kiu komencos lerni povos tuj elektronike rilati al samtempe komencinta lernato en alia lando ĉar ili ambaŭ lernos per la sama lernilo kaj konos la saman lernmaterialon kaj povos baze de ĝi komuniki. Evoluante lingvajn forumojn kaj stimulate simple privatan kontaktadon de tiuj lernantoj per modernaj rimedoj kia skype-interpraolado kaj simile, oni multoble simpligos memlernadon tra la reto.

La teamo de la Zagreba Metodo intertempe metos ĉiam pli da ekzercaj materialoj al ĉiuj retejoj kaj ebligos ke la metodo estu ĉiam pli efika.

Ni, do invitas landajn asociojn kontakti nin kiuj konsentas meti al sia retejo la Zagrebmetodan elektronikan E-kurson.
Teorio pri la Zagreba metodo troviĝas ĉe: http://www.ipernity.com/blog/pajo.zlatko/703385
http://miresperanto.com/biblioteko/tishljar/15.htm

Zlatko Tišljar

## DUDEKJARA JUBILEO DE ĜEMELIĜO INTER HEZBERG KAJ GóRA

La urboj Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo, kaj la pola ĝemelurbo Góra komence de oktobro 2013 en Herzberg festis la jubileon de dudekjara bona kaj aktiva kunlaboro. La festo estas tre bunta. Ĉe Herzberg estis aranĝitaj akcepto de la urbodomo, prezento de lokaj muzikistoj, oficiala festo, prelegoj, ekspozicioj ktp. Ĉe Góra la urbestrino Irena Krzyszkiewicz persone gvidis la urbodoman delegacion partopreni en la jubileo, kaj faris la brilan prelegon en la oficiala festo okazinta en la Kavalira Salono de la bela Kastelo Herzberg.




Ankaŭ venis okpersona grupo de la Esperanto-Klubo en Góra (EKG). Intervidiĝante la urbestrinon de Góra kaj la delegacion kaj akceptante esperantistojn de la du landoj (vidu foton 2) s-ro Gerhard Walter, la urbestro de Herzberg, tre ĝojis pri la pozitivaj kontaktoj inter ambaŭ urboj. En la festo s-ino Zsófia Kóródy el Esperanto-Centro (Interkultura Centro Herzberg) prezentis lumbildprelegon pri la spertoj de la ĝisnunaj ok ĝemelurbaj Someraj Arbaraj Lernejoj (SALO) por gejunuloj el ambaŭ urboj. Ili kune lernas kaj amikiĝas dank'al la uzado de la neŭtrala pontlingvo Esperanto. Dum la lastaj ok jaroj per tiu projekto, kiu kunligas lernejojn, gejunulojn, instruistojn kaj gepatrojn, Esperanto-klubanojn, la kontaktoj kaj bonaj rilatoj inter ambaŭ urboj multe kreskis kaj tion rimarkis kaj aprezis ankaŭ la politikistoj. La ekspozicioj enhavas du partojn, unu temas pri Esperanto-tradukaĵoj de pola literaturo, Esperanto-gazetoj el Pollando, memoraĵoj el Góra kaj produktoj de infanoj faritaj dum SALOj. La urbestrino Irena Krzyszkiewicz rigardis ĝin en la Esperanto-salono de la kastela muzeo. Alia pri pentraĵoj, i.a. pri ĉ.70 belaj artaĵoj far de la

esperantistaj pentristinoj Bozena Zajankowska, Lucyna Sozanska kaj Danuta Toloczko-Smolarska de EKG.
Esperanto-Centro kaj la urba administracio kune organizis ĝin en la urba biblioteko, en la gimnazio, en la urbodomaj oficejoj kaj koridoroj kaj en la Kavalira Salono de la Welf-kastelo.  Certe ne mankas aliaj festparoladoj, gratulleteroj kaj interŝanĝoj, ekzemple interŝanĝo inter pentristoj de la du urboj.

Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy

## SOMERA ESPERANTO-STUDADO (SES) EN SLOVAKIO

Ĉi-jare SES okazos du foje en du malsamaj lokoj:

- julie en **Nitra**, Slovakio (**12-20.07.2014)**
- aŭguste apud **Moskvo**, Rusio (**17-25.08.2014**).

Kiel kutime instruado de Esperanto okazos je 5 niveloj kiun gvidos spertaj instruistoj, kaj krome ĉi-jare dum SES en Nitra vi povos elekti anstataŭ lingvokurso partoprenon en seminario "Esperanto-literaturo kaj kulturo" kiun gvidos Jorge Camacho kaj Nicola Ruggiero.
Alternativon al kurso de Esperanto dum la rusa SES estos plentempa kurso de la rusa lingvo. Aldone, dum SES en Slovakio, estos ebleco partopreni unuan kongreson de TEVA (Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio), kiu okazos dum lastaj tagoj de SES SK.

Elekto kiun SES partopreni ĉi-jare povas esti malfacila, sed ĉiam vi povas partopreni ambaŭ ilin. Pensante pri tio ni eĉ preparis por vi specialan oferton: ĉiu, kiu partoprenos ambaŭ SES-ojn ricevas rabaton de 10 EUR dum la dua (rusa) SES de aliĝkotizo, kaj krome taso-pason por 5 EUR por gufujo!

Por ekscii pli vizitu la retpaĝon de SES:  http://ses.ikso.net/2014/

Dorota Rodzianko

## FRANCAJ GEJUNULOJ SUBVENCIATAJ POR IRI AL IJF EN ITALIO

De la 16a ĝis 22a de aprilo en urbeto Castelsardo sur la itala insulo Sardio okazos IJF (Internacia Junulara Festivalo). Vidu la retejon: http://iej.esperanto.it/ijf/?lang=eo

Kadre de ĝi okazos seminario pri organizado de eventoj. Eblos ekscii kiel kunmeti programon, kiel administri eventon, kiel prepari buĝeton. La seminario estas la dua organizata kadre de dujara partneriĝo, subvenciata de Europa Unio, pere de la programo Tutviva Lernado - Grundtvig - Partnerado.  La projekton “Volontulado kiel persona pluevoluiĝo: kiel pliboniĝi?” partoprenas pola, nederlando, skota, italaj, franca E-asocioj kaj la Federacio EDE.

La Federacio Eŭropo Demokratio Esperanto (FEDE), subvencias parton de la vojaĝo kaj restado por pluraj homoj. Ĉar FEDE estas registrita en Francujo kaj helpata de franca Grundtvig-agentejo, la subvenciato devas loĝi en Francujo. Dum IJF
la subvenciato partoprenos la seminarion (dum 1 aŭ 2 tagoj) kaj reprezentos FEDE-n.

Bert Schuman

## ESPERANTO-RADIOREKLAMO – 1002 FOJE EN 26 RADIOSTACIOJ

Inter 1-14. de februaro 1002-foje aŭdiĝis 11-sekunda radioreklamo pri Esperanto en programoj de 26 radiostacioj en Hungario! La suma elsendotempo estas 183 minutoj, kio signifas iom pli ol 3 horojn...

Elektadon de radiostacioj ni faris tiel, ke ili atingu tiujn homojn, kiuj vivas ekster Budapeŝto, ĉefe en malgrandaj urbetoj kaj eble malmulte interretumas, sed interesiĝas pri la socia komunuma vivo de sia urbeto.

La reklamo pri Esperanto estas aŭskultebla kiel la dua materialo en la suba reklambloko: http://www.eszperanto.hu/zip/radioreklam-blokk.mp3.

Traduko de la reklama teksto estas la sekva:
*"Por havi lingvoekzamenon, aŭ por via universitata akcepta ekzameno plej rapide oni povas lerni la lingvon Esperanto. Elprovu la interretan kurson! -- www.esperanto.hu -- esperanto.hu!"*

La reklamon realigis nia **"Esperanto-Centro Eventoj"**, kiu fakte estas kunlabora forumo de kelkaj E-formacioj: Fondaĵo "Eszperantó Alapítvány", societo "Eventoj" *(alinome Kultura Esperanto-Asocio)*, kaj mia entrepreno "Lingvo-Studio", L.S. – kiu ĝuste nun en februaro festas sian 30-an naskiĝdaton (fondita en 1984).

Laŭ nia scio tiom longa, kaj tiom ampleksa radia reklamkampanjo por Esperanto ankoraŭ ne okazis en Hungario, kaj ankaŭ ne en internacia Esperantujo - do ni estas nun iom fieraj. Antaŭ kelkaj jaroj la konata japana esperantisto-mecenato Etsuo Miyoshi subvenciis aperigon de tutpaĝaj Esperanto-reklamoj en kelkaj grandaj eŭropaj gazetoj. Nia ĵusa radioreklamo multe diferencas de tiu modelo: unuflanke nia kampanjo estas multe pli malgranda, duaflanke pro la kresko de la kvanto de la kursaj aliĝoj la kosto de la reklamado revenis ene de kelkaj tagoj...

Eble ne estas vaste konate, ekde 2003 (do jam de 11 jaroj) ni funkciigas propran, unikan, **pagan (!) interretan kurson** por hungaroj. NE TEMAS pri la Lernu-kurso, ni mem konstruis propran kurso-sistemon de nulo ĝis B2, sen financado fare de ESF aŭ de alia asocio. Malgraŭ tio ke ĝi estas paga kurso, malgraŭ la paralela konkurenco de la senpaga Lernu-eblo, ĝis nun aliĝis pli ol 4000 (!) hungaroj al nia interaktiva reta kurso, inter ili pluraj el la nunaj aktivuloj de la internacia Esperanto-movado *(aktivuloj ĉe Muzaiko, Tejo-Tutmonde, Biblioteko OIK-Fajszy, skoltoj-hu, ktp.)*

*László Szilvási, L.S.*
http://www.eventoj.hu

# KIEL INSTRUI PRI MULTKULTURECO DE EŬROPO



Inter la 18a kaj 20a de januaro 2014 en la sud-pollanda urbo Nowy Sącz okazis la unua seminario de la Gruntvig-projekto "*Kiel instrui pri multkultureco de Eŭropo* ".

La subvencion de la Eŭropa Unio ricevis 4 organizaĵoj: Centro de Interkultura Edukado (CEM) (Pollando – Nowy Sącz), Edukado.net (Nederlando-Hago) Filio de Germana Esperanto-Asocio por Klerigado kaj Kulturo (Germanio-Herzberg am Harz) kaj Kultura Esperanto-Asocio (KEA) (Hungario-Budapeŝto).

La ĉefa celo de la projekto estas konigi unu al la aliaj la multkulturecon de la partoprenantaj landoj, folklorajn kaj tradiciajn kutimojn, la historion, kulturon, lingvon kaj popolarton de specifaj minoritatoj kiel ekzemple en Nederlando la frisoj aŭ en Pollando la sileziaj popoloj.

Krom la reciprokaj vizitoj kaj organizado de seminarioj kaj kulturaj eventoj en la partnerlandoj, la celo estas produkti instrumaterialojn kiuj poste helpe de la reto kaj aliaj rimedoj ebligos kleriĝon pri la temoj ankaŭ mondskale. Ĝuste pri tiu metodika parto respondecos nia paĝaro, edukado.net, en kies KLERIGEJo aperos diversaj retaj kursoj kaj materialoj pri la laboro de la projekto.

Flanke de nia retejo la teamon formas la redaktoro kaj sekretario de la retejo, kaj la du tre konataj frisaj muzikgrupoj: Kapriol' kaj Kajto, kiuj per siaj koncertoj kaj seminarioj riĉige partoprenos la projektaranĝojn. Nun, en la unua programo ni vizitis la sudpolan urbon Nowy Sącz, kie disvolviĝas tre vigla Esperanto-agado. Sub la gvido de Halina Komar plurdekoj da lokaj esperantistoj pretigis kaj kune okazigis riĉan kulturan programon.



Seminariaj prelegoj de etnografo, muzeologo, historiisto, prezentoj de folkloraj grupoj kaj muzikaj ensembloj, akceptoj, koncertoj kaj diversaj surpodiaj programoj, ekskursoj kaj aktiva partoprenigo de la eksterlandaj gastoj en la tipa loka pastoralado plenigas ĉiun minuton de la tritaga renkontiĝo. Abundaj manĝoj kaj gustumado de lokaj specialaĵoj,

kundancadoj kaj kantadoj amikigis la reprezentantojn de la delegacioj kies membroj jam kun ĝojo antaŭvidas la duan renkontiĝon en Frislando (Nederlando), en majo 2014. Detalan raporton kun fotoj, filmoj kaj muziko ni baldaŭ aperigos en la paĝaro kaj en la oficiala portalo de la projekto.


Katalin Kovats, edukado.net

# EN SVITAVY (ĈEĤIO) FILTELISTA EKSPOZICIO

Klubo de amikoj de Esperanto en Svitavy kun loka klubo de filatelistoj aranĝas Regionan filatelan ekspozicion. Ĝi okazos en la ejoj de la Esperanto-muzeo en Svitavy. Informoj pri la ekspozicio estas en la retpaĝaro www.svitavy2014.estranky.cz Transdonu informojn pri tiu ĉi ekspozicio al samideanoj – filatelistoj.

Libuše Dvořáková, Esperanto-muzeo Svitavy

# 73-A HISPANA KAJ 18-A ANDALUZIA KONGRESO EN ARUNDO (RONDA) »ESPERANTO KAJ FLAMENKO« DE LA 1-A ĜIS LA 5-A DE MAJO




La urbo Arundo (hispane Ronda, Andaluzio, suda Hispanio) sin pretigas por la venonta Hispana Kongreso de Esperanto. Vidu en suba ligilo intervjuon de regiona televido pri la Kongreso kaj pri tuj komenciĝonta kurso por junuloj: http://youtu.be/rqhcFSjGzig.

Por interesiĝantoj, memoru ke hodiaŭ finiĝas la plivastigita unua aliĝperiodo, kun ioma rabato en la kotizo. Rapidu por aliĝi (se vi havas problemojn pro la sabato, skribu al la organizantoj en kongreso@esperanto.es, kaj certe ili komprenos :-))

Jam 90 homoj aliĝis, du monatojn antaŭ la komenco, kio estas vera rekordo en lastaj jaroj por iom malfruiĝema lando.

Informoj pri la kongreso kaj ĉio cetera, en http://arundakongreso2014.wordpress.com/

José Antonio del Barrio


# TUTKELTA KAJ SKOTA ESPERANTO-KONGRESOJ



La 1-a tutkelta E-kongreso, kune kun la 109-a skota E-kongreso okazos en Pitlochry, Skotlando, inter la 6-a kaj la 11-a de junio 2014. Vi havos unikan ŝancon partopreni en kongreso kun la plejmalalta cifero (ja temas pri la 1-a tutkelta kongreso) kaj la plej alta (109-a skota kongreso!). La programo estas bunta - distra, kleriga, kaj kapabliga, kaj la mirindeco de Skotlando ravos vin. Nepre partoprenu! http://skotlando.org/index.php/panceltic-congress-tutkelta-kongreso

Francesco Maurelli, prezidanto de Skota E-Asocio

# NOVA LIBRO DE VAN PARIJS




Aperis nova libro de konata lingvisto Philipe Van Parijs: »Linguistic Justice for Europe and for the World« (Lingva justeco por Eŭropo kaj por la Mondo) en kiu li mencias ankaŭ Esperanton. Jen kelkaj vortoj pri tio de Lu Wunsch-Rolshoven:

Eble Van Parijs estas iom skeptika pri la ĝenerala enkonduko de Esperanto - sed la aktualan valoron li bone komprenis:

"Esperanto is a wonderful way of linking up a fantastic bunch of generous and hospitable people around the world. For people eager to hook into this network, its learning is well worth the trouble."

(Proksimume: Esperanto estas brila vojo por ligi elstaran grupon de malavaraj kaj gastamaj homoj ĉirkaŭ la mondo. Por homoj, kiuj deziras eniri tiun reton, ĝia lernado valoras la penon.)

Philippe Van Parijs. Linguistic Justice for Europe and for the World. Oxford, 2011, p. 46

http://books.google.de/books?id=HYLov0EFUWQC&printsec=frontcover&hl=de&source=gbs_atb#v=onepage&q=Esperanto%20bunch&f=false

(Jes, mi konscias, li ne favoras la enkondukon de Esperanto kiel eŭropa lingvo, kiel oni povas legi ekde p. 39 kaj tuj post la citaĵo. Ankaŭ mi opinias, ke Esperanto kiel ĝenerala eŭropa lingvo estas nuntempe pura iluzio. Ni multe malbonigas niajn ŝancojn tion iam ajn atingi, se ni nun parolas pri tio. Se oni volas superruzi sian malamikon, oni ne tro parolu pri siaj planoj. Kontraste nia nuna strategio estu silentegi pri niaj altaj planoj kaj proponi Esperanton nur kun la aktuala lingvokomunumo kaj ĝiaj eblecoj.)

Lu Wunsch-Rolshoven
EsperantoLand

**Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.**
**Finredaktita: la 28-an de februaro 2014**
**Redaktoro: Zlatko Tišljar**
**En la numero kunlaboris: Maja Tišljar, Zlatko Tišljar, Bert Schuman, Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy, Dorota Rodzianko, Katalin Kovats, László Szilvási, Libuše Dvořáková, Francesco Maurelli, José Antonio del Barrio.**
**Kontakto:** ztisljar@gmail.com
**Retpaĝo:** http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno

Eŭropa Esperanto - Unio
Por efika kaj maldiskriminacia komunikado
www.europo.eu